En Japanio kaj Koreio mi ofte rolis kiel gastinstruisto, uzante la lingvosperanton kolektitan en Eŭropo. Fakte mia ĉefa instruista rolo estis paroligisto. Japanio kaj speciale Koreio estas relative izolataj de aliaj landoj kaj alilandaj esperantistoj, do maloftas la okazoj paroli la lingvon kun eksterlandano — speciale en la pli malgrandaj urboj. Tiun situacion mi bone komprenas pro paraleloj en Usono.

La sperto en Koreio estis tre speciala, parte pro la grava diferenco inter la tiea E-movado kaj tiu en multaj eŭropaj kaj nordamerikaj landoj: En Koreio mi plurfoje aŭdis seriozajn plendojn pri manko

de maljunaj esperantistoj! Mi taksus la mezan aĝon de Koreaj esperantistoj je 25! La movado estas tre entuziasma kaj vigla, kio tre ĝojigis min. Ĉefa manko estas Kontakto kun spertaj eksterlandaj samideanoj.

En Kameoka, apud Kioto, mi havis okazon gastigi ĉe Oomoto dum entute 7 semajnoj kaj volontule kunlabori en la Esperanto-Propaganda Asocio en la internacia fako de Oomoto. Oomoto bonvenigas vojaĝantajn esperantistojn el la tuta mondo en sia ĉefsidejo sur la bela tereno de la ruino de la Kameoka Kastelo. En 1988 la unuan fojon okazos esperantlingve la fama Internacia Lernejo pri Tradiciaj Japanaj Artoj dum du semajnoj de la 11-a ĝis la 26-a de majo, en Kameoka.

Jen kelkaj nombroj pri mia vojaĝo, kalkulante nur la noktojn (kie mi trankontis):

tuta vojaĝo	1130
gasto en esperantista loĝejo	439
Restado en esperantistejo (plej ofte kiel volontulo) ĉe Esperanto-kongresoj aŭ renkontiĝoj	333
gasto ĉe ne-esperantistaj amikoj (usona amiko en Japanio, kaj homoj kiujn mi renkontis en Eŭropo per esperantistoj)	156
veturiloj (vagonaro aŭ ŝipo)	43
tendumado dum biciklo-ekskursoj	49
junulargestejoj (ne inkluzive la E-renkontiĝojn tie okazintajn)	28
hoteloj (ne inkluzive E-renkontiĝojn okazintajn en hotelo)	13
(noto: nur unu hotelnokto mempagita: la aliaj gaste de esperantistoj malavaraj)	9

Mi spertis kelkajn nekutimajn trankontojn: malnova urbodomo en Miltonberg FRG (kun BEMI), hospitalo (kiel gasto de la ĉefkuracisto), budhisma monaĥejo en Japanio, kaj ĉe jazfestivalo en Hungario, ekzemple.

Dum mia vojaĝo mi instruis ĵonglon al pli ol 200 homoj, kaj kelkaj el tiuj plu

instruas al aliaj.

Mi lernis promenskii en Svislando ĉe KCE kaj dum paska ski-renkontiĝo esperantista en Norvegio. Unu jaron poste mi lernis alvalskii en Japanio sur la fama monto Zao dum la tiea ĉiujara esperantista skiferio.

Dum la vojaĝo mi kutime portis informilojn pri esperanto nacilingvaj kaj ofte havis okazon informi pri la lingvo. La fakto, ke mi konstante uzis ĝin kun miaj gastigantoj altiris atenton, kaj pluraj gastigantoj miris kiom pli efike funkcias varba informado kiam videblas la praktiko de la lingvo.

Miaj foto kaj rakonto aperis en tagjurnaloj dekojn da fojoj, kaj mi aperis en kaj aŭdeblis per televido kaj radio kelkfoje. Ankaŭ en la Esperanto-gazetaro aperis mia nomo plurfoje, sed pli ofte kiel verkinto ol kiel aginto.

Fine de mia volontula periodo ĉe Oomoto, mi interkonsentis kun ties Internacia Fako reveni tien frue en 1988 por plentempe helpi la laboron de Esperanto-Propaganda Asocio. Do, vi povos daŭre vidi parton de mia laboro sur la paĝoj de la Esperantlingva revuo Oomoto (abonebla i.a. ĉe UEA [kaj ELNA — red.]) kiu jam nun (pro nova presisto) pli belaspektas ol antaŭe. Kaj mi ripetas la inviton de Oomoto al ĉiuj esperantistaj amikoj viziti min en Kameoka ĉe Oomoto.

Kiam mi revenis al Usono mi partoprenis en la bonega trisemajna intensiva esperanto-kurso ĉe San Franciska Ŝtata Universitato, kaj renkontis plurajn esperantistojn usonajn. Dum pli ol du monatoj mi restis ĉe mia fratino en Spokane kaj tralegis la monton da poŝtaĵo kiu min atendis, kaj, ĉefe, enkadrigis, identigis, kaj ordigis arojn el la 3000 diapozitivaj kiujn mi faris dum la vojaĝo. Kun helpo de ELNA (Esperanto-Ligo por Norda Ameriko) mi organizis prelegvojaĝon ĉirkaŭ Usono.

Uzante elektitajn diapozitivajn de mia mondvojaĝo por ilustrati la tekston, mi prelegis pri malmultekosta vojaĝado ne kiel turisto, sed kiel amiko — kiel homo kiu interesiĝas ĉefe pri aliaj homoj kaj aliaj vivmanieroj kaj kulturoj. Komprenoble Esperanto estas grava rimedo por kontakti kaj komuniki kun homoj tutmonde.

Per buso mi veturis 15 000 kilometrojn al 27 urboj por doni 70 prezentaĵojn al

1220 homoj, de 1987 okt 3 ĝis 1987 dec 17. Mi gastis ĉe esperantistoj aŭ parencoj kiuj organizis surloke la prelegojn. Foje prezento estis al nur esperantistoj kaj esperantlingva, sed pli ofte mi prezentis al ĝenerala publiko aŭ en lernejoj aŭ universitatoj—anglalingve. Foje mi parolis sen lumbildoj, sed pli ofte kun. Mi ĉiam ricevis pozitivajn reagojn. Kelkfoje iuj reagis tre entuziasme pri esperanto kaj eblecoj ĝin uzi por internaciaj kontaktoj.

La usona rondvojaĝo donis al mi ankaŭ la okazon vidi miajn gefratojn kaj kelkajn aliajn parencojn kiuj loĝas dise en Usono.

Nun mi ripozas (!) iomete ĉe mia fratino en Spokane dum la vintra Silvestra ferisezono, kaj preparas reiri al Japanio por eklabori ĉe Oomoto la komenccon de februaro.

Mi deziras al vi ĉiuj vian ĝisnun plej bonan jaron en 1988!

Elkorajn Salutojn kaj denove dankon.
Amike vi,
(subskribis) Joel Brozovsky

December 1987

Dear Folks,

Now that my seventy-four day tour of Usona is over, I can look back at it with some perspective and give you an overview. But first, I wish to thank each of you who invited me into your homes along the way, and each of you who helped arrange the slide shows in your parts of the country. I especially want to thank ELNA (the Esperanto League for North America), who not only helped put me in contact with most of you, but paid for my bus tickets.

I traveled about 15 000 kilometers (10 000 miles) to 27 cities. I stayed in 27 peoples' homes along the way. I gave about seventy presentations (not always with slides) to about 1220 people. I was also interviewed live on radio twice and taped for TV.

I always received positive reactions to my presentations (although not exclusively). On many occasions I could see a lot of enthusiasm generated for Esperanto. I hope that you will follow through to properly exploit that enthusiasm.

My primary purpose was to inform about inexpensive international traveling and making friends overseas. I illustrated my talks with slides and anecdotes from

my recent three-year trip around the world. I talked about Esperanto as a means to that end, rather than trying directly to convince people to spend a lot of their time and effort to learn a language for which they could not see much use in the United States. I also hoped to inspire and enthuse already-Esperantists, especially young ones, to put their language to work.

Audiences were not always as large as I might have desired, due to many factors: inopportune time of week or month, bad weather, lack of time or expertise on the part of the organizers (resulting in insufficient or ineffective publicity). Lack of lead time often played a key role limiting publicity. I did not have much time to organize the trip, so most of you didn't know much ahead of time when I was coming. Procrastination occasionally contributed to that problem, too.

If I had had more time, there is much I could have done to help the local organizers with publicity. A sample news release with information about me and about the lectures would have helped much, along with some pointers on how to go about publicizing an event. Sherry Wells in Detroit has been taking a course in publicity, and has volunteered to put together a brochure for ELNA with just such useful information, for "next time."

There were many successes along the way, as you might imagine with a total audience of over a thousand. The largest total live audience was in Portland, Oregon, with 270 people, 190 of whom were grade school kids. Second place was Detroit with 224, 162 of whom were high school kids. Detroit had the largest single public (non-school) audience: 55 people came to the public "open house" for Esperanto which Sherry Wells used as an exercise for her publicity course. Santa Barbara was not far behind with 50, and, in fact, with only three esperantists amongst that fifty, this was the largest non-esperantist, non-school, single audience, which was made up largely of bicycle and youth hostel enthusiasts.

Third place in total live audience was a pleasant surprise. In Tucson, I talked to 150 students of anthropology and sociology at Pima Community College. Roger Irwin, who participated in the SFSU courses* in 1987, has managed to sneak

Esperanto into the curriculum through the back door, as part of a course on Utopias. Judging from the reactions of several students who heard my talks, I suspect that next semester the class may have more students interested in Esperanto than in Utopias.

Showing (from one's own personal experience) that Esperanto is not just a great idea, but a living, practical language, seems to be an effective means of enlisting support for the international language. Good, honest information does a lot to dispel opposition. This, I believe, is of utmost importance at this time in the U.S.—to do away with the opposition stemming from ignorance and prejudice, and to win many to support the idea of Esperanto even if they are not yet willing to learn the language. This broad popular support and lack of opposition is a prerequisite for introducing Esperanto into schools as an elective foreign language.

I hope that others will be inspired to do similar, or possibly other kinds of information campaigns in the near future. The experience gained on this one should make the next one easier and more effective.

I was delighted to find that also here in Usona there are very friendly and helpful people throughout the country. It was a great pleasure to meet Esperantists, as well as members of my family, all over the United States. It was important to me to establish this sort of ties to the Usonian Esperanto movement before going to live in Japan for the next few years.

May 1988 be your best year yet.
Ĝis revido!

(signed) Joel Brozovsky

P.S. I want to especially thank Mark Stephens, who took the time from his "normal" duties reorganizing the ELNA office, to help make arrangements for my tour. Mark has been kept quite busy learning toe ropes, as well as untangling the strands, and I am delighted to see that the ELNA office is beginning to function like an office again, and that book orders, subject to stock on hand, are now sent out within a day. Keep up the good work!

* Every summer there is a 3-week session of intensive Esperanto courses for college credit at San Francisco State University.

WHY WE NEED A STRONG NATIONAL ASSOCIATION

By Cathy Schulze

"Why should I join ELNA?" is a frequent question. I answer it thusly.

First, What is ELNA? Quite simply, ELNA is all of its members working together. Most of us were introduced to the International Language because of some activity of association members—a letter to the editor, article, TV, radio, or newspaper interview, or talk to a service club.

If we learned Esperanto on our own, we were probably advised on learning materials by someone in ELNA. If we attended a class, that class was possibly possible because of cooperation and encouragement between ELNA members. If ELNA works, it is because we are working.

We are often asked why Esperanto has not become more widely adopted. My answer: It is remarkable not only that Esperanto continues to prosper but that it is still around at all, given the official neglect and the grassroots nature of Esperanto's promotion from the earliest years.

Another frequent question, How many people speak Esperanto? or How many Americans speak Esperanto? We have no way of knowing the answer to either

question because so many Esperanto-speakers are not members of any organization. (Similarly, we have no way of knowing how many people play bridge because relatively few join a national association.)

So, what good is ELNA? It's very difficult to persuade a legislator or an educator to become interested in Esperanto when a big country like ours can show less than one thousand members. For sheer prestige, we need a strong national association.

In short, ELNA represents us to the public; it provides the glue that keeps individuals and groups in touch, encourages common goals, initiates programs, and advises through its information services.

And finally, those of us working to promote the use of Esperanto are really quite selfish—after all, the more people using Esperanto, the more value the International Language has for us.

I hope that you have written your 1988 check long before reaching this point. On behalf of the Executive Board of ELNA, I wish you a happy 1988 with many interesting friends added to your roster—a lot of them right here in ELNA!



Esperanto Film from Yugoslavia Was Up For Oscar

Spomenka Štimec of the International Cultural Service of the Croatia Esperanto League, Zagreb, Yugoslavia, has informed UEA Chief Delegate Wm. R. Harmon that a Yugoslavian film "Deja Vu", which is apparently a "horror" movie with some Esperanto dialogue, came close to being nominated for an Oscar in its category.

According to ELNA member (and long-time "Mr. Monster" of Hollywood)

Forrest Ackerman, while the Academy of Motion Picture Arts and Sciences has recently started considering foreign films for Oscars, it is the usual practice of the Academy not to announce candidates until the prizes themselves are announced. Watch for it!

(Editorial comment: Some of us still remember "Inkubo" and fervently hope that "Deja Vu" will be an improvement!)

News from Abroad

AFRICA: The 1987 World Esperanto Convention in Warsaw attracted the biggest representation ever of Esperantists from various African countries. This expanding UEA program welcomes participation by groups desiring contacts and twinning with African Esperanto clubs. For contacts, send your requests with two International Reply Coupons (available at your Post Office) to the UEA representative, Hans Bakker, Kastelenstraat 231-II, 1082 EG Amsterdam, The Netherlands.

CHINA: Beginning and intermediate Esperanto courses are being broadcast in the Inner Mongolian city of Huhhot.

CHINA: After 16 years of work by 31 Esperantists, an Esperanto-Chinese dictionary, containing 18,000 roots, was published in March, 1987.

CHINA: More than 1,900 Chinese have enrolled in the Esperanto correspondence course offered by the University of Guangzhou

HAITI: Emmanuel Gauthier, a linguistics student in Port-au-Prince who took his advanced Esperanto studies at San Francisco State University, reports new Esperanto classes, an 8-minute interview on the national radio station, and appearance of his article "Esperanto and International Communication" in the university review *Jeune Medecine*.

ISRAEL: The Finnish novel "Seven Brothers" by Aleksis Kivi, which appeared in Esperanto in 1947, has just been retranslated into Hebrew.

ITALY: Five professional teachers have just completed an advanced Esperanto course in Ascoli Piceno.

KOREA: The Korean Tourist Corp. has formally adopted Esperanto as a language of tourism. Due to the growing

number of Esperantists visiting there, 28 Esperantists in Seoul have been selected for this duty.

SPAIN: The Spanish Esperanto Museum is located in the Catalonian town of Sant Pau d'Ordal. Address of the curator: Luis Marin Hernandez Yzal, Ap. Correos 83, 08720 Vilafranca Panades, Spain.

Roy McCoy writes from the Middlebury Spanish School in Madrid: "I arrived by train in Sant Pau d'Ordal, the Catalonian town near Barcelona ... The visitor is struck by various characteristics of the Spanish Museum. It contains a quite comprehensive collection of international language publications ..., all immaculately clean and very well organized. A large percentage of the periodicals have been bound in luxurious bindings. Everything is directly accessible to the visitor."

UNITED NATIONS: In a recent report by the General Assembly, the World Esperanto Association was cited as a model non-governmental organization during 1986, the Year of Peace.

YUGOSLAVIA: In Zagreb where there have been between five and 15 Esperanto classes annually during the past 15 years, the city government has just agreed to finance all elementary school Esperanto classes.



HELPOPETO EL MALAGASIO

Universala Kultura Servo ne kutimas helpon peti eksterlande. Dum multaj jaroj, ĝi senbrue kaj modeste laboradis por Esperanto-disvastigado tra Malagasio kaj memfinancas siajn agadojn. Ni povas certigi, ke ĝis nun nur UKS sukcesis formi la plej bonajn malagasajn esperantistojn.

La nuna situacio ne plu ebligas al ĝi agi tiele kaj ĝi estas devigata sin turni eksterlanden por trovi kunhelpantojn, kiuj pretas iel subtenadi la pluigon de la agado.

Nuntempe profesiaj geinstruistoj tra la diversaj departementoj (Fivondronana) de Malagasio eklernas Esperanton kaj estas formataj por pli poste instrui la lingvon en siaj respektivaj loĝlokoj. En Malagasio estas 115 Fivondronana kaj en multaj el ili ankoraŭ ne estas kursanoj de Esperanto kaj UKS plu strebadas por konvinki la instruistojn. Tiu laboro ne estas tiom facila pro manko de adekvata informilo kaj lernmaterialo.

Por siaj agadoj, UKS serĉas:

- 1 - eksterlandajn esperantistojn, kiuj pretas helpi la kursanojn en la praktikado de Esperanto;
- 2 - organizaĵojn (kaj kiel na individuaj esperantistoj), kiuj:

- konsentas donace presigi informbroŝurojn po certa kvanto (minimume 1.000 ekzempleroj)
- konsentas senpage presigi ofsete kursfoliojn: 30 lecionoj + taskoj x 1.000 ekzempleroj
- donace abonas la kursanojn al Esperanto-periodaĵo
- donacemas Esperanto-librojn kaj studmaterialojn

Aliaj donacoj kaj helpoj, kontribuajtoj estas ĉiam bonvenaj.

GRAVA ATENTIGO

Kion ajn vi sendos al UKS ĉiam aerpoŝte tion faru; alie via sendaĵo aŭ atingos nin post unu jaro eĉ pli aŭ perdiĝos. Vian sendaĵon vi povos franki registrite.

ADRESO:

UNIVERSALA KULTURA SERVO
Boite Postale 1663
101 - Atanananarivo
Malagasio

Announcements

The **All-California Conference of Esperanto** will be held at the California State Department of Education on Friday, 25 March 1988, through Sunday, 27 March. The conference theme: "Esperanto as a bridge language in education." The conference will include speeches, lectures and workshops; the keynote speech will be given by ELNA vice-president Prof. Duncan Charters of Principia College, Illinois. Registration: \$25. Banquet: \$15. For further information, contact the Sacramento Esperanto Society, P.O. Box 60860, Sacramento, CA 95860, tel. (916) 485-3116.

Aŭstra-Slovena Kantgrupo Planas Viziton al Usono. Laŭ letero de Katerina Zablatnik el Klagenfurt/Celovec en Korintio, Aŭstrio, rekona ok-vira kantgrupo "Suha" kiu kantas ne nur en slovena, germana, friula, kroata, franca kaj rusa lingvoj sed ankaŭ en Esperanto planas viziton estontece al Usono. La grupo, ĉiuj el kiuj laboras en unu vojaĝagentejo en Klagenfurt, jam kantis kelkfoje al esperantistaj kuniĝoj en Maribor, Graz, kaj aliaj lokoj. S-ino Zablatnik skribos aparte al Esperantistaj grupoj en ĉefurboj en Usono por peti helpon kontakti lokajn sloven-divenajn grupojn kaj aranĝi koncertojn. (Plia informo haveblas de usona ĉefdelegito de UEA Wm. R. Harmon, pere de la C.O. de ELNA.)

La Akademia Centro Interlingvistika en Varsovio raportas: "Esperantologoj, interlingvistoj kaj aliaj fakuloj interesitaj pri interlingvistika problemaro povas ricevi "Informilon por Interlingvistoj" eldonatan de Akademia Centro Interlingvistika kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA. IPI-kajeroj enhavas informojn pri nove publikigitaj studoj pri ĉiuj aspektoj de interlingvistiko kaj esperantologio, informojn pri esploroj kaj esplorprojektoj, pri konferencoj kaj seminarioj en kaj ekster la Movado. Fakuloj interesitaj pri inter-

lingvistika kaj esperantologia temaroj povas ĝin senpage ricevi de: Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, Nederlando."

Por radio-amatoroj: **Radioamatora Esperanto-Rondo de Sudameriko**, sabate k dimanĉe je la 20.30 UTC sur 14.266 kHz (bendo 20 metroj). Por aliaj eblaj komunikadoj en aliaj horoj kaj bendoj, kontaktu min (CE 4JLK). Trovu min sur 28.475 ĝis 28.495 ĉiutage inter la 22a kaj 23a horoj UTC. **VOKU ESPERANTE!** Adreso: Hector Campos Grez, P.O.K. 231, Curico, Chile S. A.

The following books are available for \$10 each from the Center for Research and Documentation on World Language Problems, 777 United Nations Plaza, 1st Floor, New York, NY 10017. When ordering, checks should be made payable to "UEA."

OVERCOMING LANGUAGE BARRIERS: THE HUMAN/MACHINE RELATIONSHIP. Ed. Humphrey Tonkin and Karen Johnson-Weiner. New York: CRDWLP. 1986. 117p. Contains ten papers presented at the Fourth Conference on Language and Communication (New York, Dec. 1983). An overview of the present state of machine-assisted translation in government, industry and international organizations. Other topics covered include the use of satellites in conference interpreting and the use of interactive videodisc in the teaching of foreign languages.

THE IDEA OF A UNIVERSAL LANGUAGE. Ed. Humphrey Tonkin and Karen Johnson-Weiner. NEW York: CRDWLP, 1986. 133p. Contains ten papers presented at the Fourth Conference on Language and Communication (1983). Commentary on the history and prospects of invented languages and a

detailed review of the present status of Esperanto on the eve of its centennial.

Esperantistoj en Sidney kaj Victoria, Brita Kolumbio, kore invitas vin al partopreno en la **30a KONGRESO DE LA KANADA ESPERANTO ASOCIO** kaj **2a PRINTEMPA EKVINOKSA ESPERANTISTA RENKONTIĜO** en Sidney, B.K., inter la 25a kaj 27a de marto, 1988, ĉe Sidney "Travelodge" (apud "Victoria Internacia Flughaveno"). Kotizo: CND\$20. Por informoj: Esperanto Western Canada, P.O. Box 2159, Sidney, B.C., V8L 3S6.

ESPERANTISTOJ BV HELPI RETROVI por nederlanda malsanulino la patron: James Minor Melton, nun ĉ. 60-jaran, militservantan en 1944-45 en Surinamo. Li studis teologion, havis poŝtadreson en Brownsboro, TX (poŝtkeston) kaj loĝis en Palestina (TX), kie nun mankas informoj. Se vi povas helpi, bv. kontakti R. Moerbeek, ĉe la C.O. de UEA en Rotterdam.

Flugfolio kun someraj viziteblecoj haveblas por la **KULTURA ESPERANTO-DOMO**, Kastelo Gresillon, F-49150 BAUGE, Francio. Laŭ akompana mapo, Bauge troviĝas en la bela valo de la Rivero Loire, en la provinco Anjou. Aliajn informojn esperantlingvajn pri turismo en la provinco Anjou oni povas ricevi, sendinte respondkuponon, de: Syndicat d'initiative, Saint-Aubin-de-Luigne, F-49190 ROCHEFORT-sur-Loire, Francio; kaj Esperanto-Centro, s-ro A. Frangeul, 6 rue du Buis, La Roseraie, F-49000 ANGERS, Francio.

La Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj decidis organizi **akupunktur**an kurson instrui kaj praktiki ĝin en Esperanto. Tempo: 16 de julio ĝis 8a de aŭgusto 1988 (tuj antaŭ la 2a Internacia

Continued on next page

Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto) en Pekino, Ĉinio. Kosto por lernado kaj loĝado, entute \$700. Por informoj kaj aliĝo, bv. skribi al: s-ino Wang Yuchun, Esperanto-Asocio, Akademia Sinica, 52 Sanlihe, Beijing, Ĉinio.

2a INTERNACIA AKADEMIA KONFERENCO PRI SCIENCO KAJ TEKNIKO EN ESPERANTO 10-16 aŭgusto, 1988, en Beijing, Ĉinio. Temo: "La reciproka efiko inter scienco-tekniko kaj socio." Oficiala laborlingvo: Esperanto. Post la kongreso okazos plurtagaj vojaĝeblecoj en Ĉinio. Aliĝkotizo estas \$18 antaŭ la fino de aprilo kaj \$24 poste. Por informoj kaj aliĝilo, bv. kontakti: s-ino Wang Yuchun, Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, Beijing, Ĉinio.

IJS - '88. Hungara Esperanto-Junularo denove organizas internacian junularan ferian semajnon en Szeged inter 10a kaj 16a de julio 1988. Por la partoprenantoj estos organizita karavana vojaĝo al Internacia Junulara Kongreso, okazonta en Zagrebo. La programo antaŭvidas: noktan banejon, bivak-fajrojn, ekskursojn kaj aliajn distrajn programojn, krome kelkajn seriozajn programojn. Oni povas loĝi en ripozejo aŭ tendumi. Kostoj antaŭ la de majo: 80-150 gld. (proks. \$45-\$80). Pliaj informoj kaj aliĝiloj haveblas ĉe: Hungara Esperanto-Junularo, Budapeŝt, Pk. 193., H-1368 HUNGARIO.

Esperanto-Societo Kebekia okazigas amikan renkonigon apud Montrealo sed en natura medio. Dato: 88.05.28-29. Temo: vojaĝoj. Pliaj informoj ĉe: Esperanto-Societo Kebekia, C.P. 126, succ. BEaubien, Montreal, Quebec, KANADO H2G 3C8.

Por prilaborata familia historio kaj fonda Familia Esperanto-Klubo informojn pri loĝantaj en diversaj landoj familioj Knobloch, Knoblock, Knoblauch, Knebloch, Knoblich k.s. serĉas: Wanda Knobloch, skr. poczt. 312, PL 50-950 Wroclaw 2, Pollando.

La redakcio de la revuo **Sovetskij Uzbekistan** konsentis havigi al si Esper-

antan rubrikon. En la rubriko aperados en Esperanto kurantaj informoj pri la nuntempa kaj antikva Uzbekio, leteroj de legantoj, respondoj al la leteroj, literaturaĵoj. La unua E-rubriko aperos en la aprila numero de 1988. Se vi interesiĝas en tiu malmulte konata parto de la mondo, kaj se vi volas helpi al la uzbekaj samideanoj, kiuj instigis la aferon, bv. skribi en Esperanto aŭ en unu el la lingvoj de la revuo (uzbeka, rusa, araba, daria, germana, persa, angla, urdua, hispana k.a.) al: "Sovetskij Uzbekistan", Lenin-str. 41, SU-700000, Taŝkento, Sovetunio.

Oomoto anoncas, ke ĉijare okazos **La Oomoto-Lernejo de Japanaj Tradiciaj Artoj: Kultura Seminario por Esperantistoj** inter la 11a kaj 26a de majo. Oni loĝos ĉe la Oomoto-Centro en bela Kameoka, 22 km okcidente de Kioto, kaj studos tradiciajn artojn kiel noan dancon, teceremonion, kaligrafion, skermarton, ceramikan arton kaj meditan teknikon. La aliĝo estas limigita je 8 studentoj. Por informoj: Oomoto, Kameoka-si, Kyoto-hu, 621 Japanio, tel. 07712-2-5561.

La Kataluna Esperanto-Asocio kaj la Konservantario de la Internaciaj Floraj Ludoj invitas la ĉiulingvajn esperantistajn geverkistojn kunkurse kunkuri per siaj plej valoraj verkoj en la tradicia trobadora **Festo de la 28aj Internaciaj Floraj Ludoj**, kiu okazos en la kadro de la 24a Kataluna Kongreso de Esperanto en la jaro 1988a. Por regularo pri la Floraj Ludoj, skribu al la Sekretario de la Konservantario: Joan Ramon Guinon i Roset, Carrer Vilamari 106-108 baixos interior segona, E-08015 Barcelona, Catalunya/Katalunio (Hispanio).

Heroldo de Esperanto ne plu situas en Hispanio; la redaktoro, s-ino Ada Figniera-Sikorska, translokiĝis al Italio komence de 1988. Por korespondadoj, bv. uzi ŝian novan adreson: "Heroldo de Esperanto", Via N. Sandre 15, I-10078 VENARIAR.-Torino, Italio. Pagojn sendu al la landaj perantoj (en Usono, ELNA), al la poŝtĉekontoj Bruselo 000-0078887-26 (Belgio) aŭ Koln 194943-504 (Germanio), aŭ al A. Sikorska-"Heroldo", conto 32108, Banco di

Roma, via Alfieri, Torino (Italio).

Malgraŭ la lastatempe bedaŭrinda morto de d-ro Istvan Szerdahelyi, la laborado en la Esperanto-fako en la **Budapeŝta Universitato Eotvos Lorand** daŭros. Dron Szerdahelyi anstataŭos eĉ du plentempaj postenuloj, d-rino Ilona Koutny kaj d-rino Zsuzsa Varga-Haszonits, antaŭaj kunlaborantoj de d-ro Szerdahelyi.

The United Nations Association of the United States of America, of which ELNA is an affiliated organization, on February 15 released an 80-page briefing book **UNA National Study to Recommend U.S. Agenda at U.N.** The book is intended to initiate a national debate on such subjects as arms control and disarmament, human rights, health environment, labor and trade, drug abuse, the World Court, conflict resolution, and U.N. management and decision-making. Copies of the book are available for \$7.50 from: Publications Department, UNA-USA, 485 Fifth Avenue, New York, NY 10017. If you are a member of ELNA, specify this in your order for a special price of \$6.00 to members of UNA and its Council of Organizations.

Esperantist Lou Harrison of Aptos, California, is better known to the world at large as a composer. His **Koro-Sutro**, a hundred-voice choral piece with lyrics in Esperanto, is now available on either compact disk or cassette from Albion Records, 584 Castro St. #463, San Francisco, CA 94114.

The Central Office of ELNA is hoping to have the 1988 **Adresaro** ready by sometime in May. If you have not already renewed your membership for 1988, and would like to have your name and address in this year's **Adresaro**, please use the convenient membership form on page 23 at once.

Until further notice, please send all materials for the ELNA Newsletter to: ELNA Newsletter, c/o ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. The temporary editor is Don Harlow, who in an emergency may be reached (after 7 p.m.) at (415) 222-0187.

JARRAPORTOJ DE ELNA 1987

JARRAPORTO DE LA KOMISIITO POR GVIDADO DE CENTRA OFICEJO

Je la komenco de ĉi tiu jaro okazis alia en la longa sinsekvo de ŝanĝoj de direktoroj de la Centra Oficejo. Unu el la ĉefaj funkcioj de la Komisiito por Gvidado de la Centra Oficejo estas servi kiel daŭriga ligo, ripozejo de spertoj el la pasinteco kiu povas helpi al nova direktoro lerni la metodojn kaj la uzon de la rimedoj por la funkciigo de la CO. Dum la jaroj, iuj el la pasintaj direktoroj spite al dediĉiteco kaj bonvolo ne tute ellernis la bezonatajn rimedojn, kaj rezulte falis sur miaj ŝultroj pli granda laboro. Estas plezuro raportii, ke la aktuala direktoro, Mark Stephens, ne nur bone lernis la rimedojn kaj rutinojn, sed portis al la posteno bonan scipovon pri statistiko kaj administrado. Ĉi tio ebligis al ni krei novajn rimedojn por faciligi la laboron kaj plifirmigi la bazon de ELNA.

La laboroj de la CO ankoraŭ estas sufiĉaj por du aŭ tri homoj. La librotendado mem povus okupi profesiulon 2 aŭ tri tagojn semajne. Almete al tio, la kunigo de libroj por plenigi mendojn, la enpakigo kaj enpoŝtigo; la respondo al informpetoj; la disvastigo de informoj al lokaj kluboj; la respondo al ekster-Usonaj petoj; ĉiuj plene okupas 80-horan semajnon. Ĝis nun ne ekzistis rimedoj por dungi pli ol unu laboranto en la CO; sed ni ankoraŭ ege bezonas almenaŭ duon-tempan librotendiston, kaj se volontula helpo por la aliaj laboroj ne sufiĉas, ni bezonas almenaŭ duontempan laboranton por la aliaj ĝeneralaj laboroj. Espereble la lastatempaj akiroj de kapitalo tion ebligos.

Mi daŭre mem traktas ĉiujn UEA-aferojn en la CO, por ke tiu laboro ne pluŝarĝu la jam tro okupitan direktoron. Tiu laboro okupas meznombre 12-15 horojn semajne. El tiu laboro la profitoj (procentoj de UEA-kotizoj kaj kongreskotizoj) sumas proks. \$1600 jare, kio iras rekte en la kason de ELNA.

Mark Stephens iel trovis la tempon pensi pri niaj bazaj informiloj pri Espe-

ranto, kaj aparte vi ricevos sugestojn de li pri pli-efikigo de tiuj informiloj. Ankaŭ li ellaboris planon por pligrandigi la volontulan helpadon en la CO. Tion mi traktos kun la Estraro, kune kun aliaj proponoj por pli-efikigo de la CO.

Unu el la ĉefaj ĝenoj ĝuste nun, kaj ĝi estas nenio nova, estas la ŝajne konstante plimalboniĝante poŝta servo de Usono. Ni ricevas pli kaj pli da plendoj pri nelivero de libromendoj kaj kvitancoj, kaj en preskaŭ ĉiu okazo, ni trovas, ke la kulpo estas tiu de la poŝta "servo". Librojn nun bezonas 4-6 semajnojn aŭ pli esti liveritaj eĉ en la sama ŝtato. Unuaklasa letero povas preni ĝis 10 tagojn atingi la celon; en aliaj okazoj ĝi estas liverita la sekvan-tan tagon. Mi atentigas ĉiujn, ke oni devus esti tre pacienca pri prokrastoj; preskaŭ ĉiam la kulpo ne estas tiu de la CO, sed la Usona poŝta sistemo, Eĉ UEA agnoskas tiun problemon.

Kiel en pasintaj jaroj, mi sugestas, ke se iu havas problemon kun la agadoj de la Centra Oficejo de ELNA, tiu kontaktu min rekte ĉe mia oficejo aŭ hejmo kaj mi tuj enketos. Estas la konstanta celo de la ELNA CO liveri la plej bonan servon eblan.

(subskribis) Wm. R. Harmon

RAPORTO DE LA ĈEFDELEGITO AL LA LANDA ASOCIO 1986/7

Sekvas statistiko pri la anoj de UEA en Usono laŭ kategorio je la unua de julio:

	'87	'86	'85	'84	'83
Dumviva	123	123	122	126	132
Mem.-Abon.	196	186	168	220	173
MA-K (Jun.)	14	14	9	3	7
Mem.-Jarlibro	46	43	37	56	51
MJ-K (Junulo)	8	5	1	8	1
Mem.-Gvid.	14	13	—	—	—
SUMOJ	401	384	337	413	364

Komento: La plej esperiga fakto sarkebla el tiuj statistikoj estas, ke la nombro da junulaj membroj daŭre kres-

skas.

La delegita rego daŭre iom kreskas ĉiun jaron. En la 1987a Jarlibro estas listigitaj 200 delegitoj (inkl. fakdelegitojn, vicdelegitojn, kaj junul-delegitojn) de UEA en Usono. En 1986 la nombro estis 198; en 1985, 241; en 1984, 178; kaj en 1983, 207.

La perantaj laboroj de via ĉefdelegito en la C.O. de ELNA por UEA-aferoj gajnis entute iom pli ol \$1300 por la ELNA kaso dum la jaro.

Por la Usona delegita reto kaj UEA-anaro, mi sendis fortan plendon al la C.O. de UEA en Roterdamo tuj post la finfina apero de la 1986a Jarlibro. Ĝi estas nekredeble malbone redaktita kaj eldonita. La direktoro de la C.O. de UEA esprimis bedaŭron, kaj klarigis, ke la problemo rezultis el komputera katastrofo plus manko de sufiĉaj helpantoj tie. La 1987a Jarlibro nun aperis (kaj en la sama jaro, kio estas pliboniĝo mem!). Laŭ la apero de tiu lasta Jarlibro, UEA ja solvis la problemojn. La listigo estas ĝusta. Nur mankas la apero de Golden-dale WA sur la Usona mapo — sed povas esti, ke en tuta Eŭropo mankas mapo kiu montras la lokon de tiu metropoleto.

(subskribis) Wm. R. Harmon

RAPORTO DE LA ELNA FONDUSO POR STUDENT-STIPENDIOJ POR LA SAN FRANCISCO STAT-UNIVERSITATO-ESPERANTO-KURSARO

Dum la pasintaj 18 jaroj, la ELNA-student-fonduso por SFSU helpis 88 kursanojn studi dum la someraj sesioj.

Stipendioj ĉijare venis de plur/pluraj individuaj membroj kaj la San Francisco kaj Portland-kluboj. Vera savo estis tiu sindonemo ĉar la bezono estis granda kaj la fonduso komencis la jaron mizer-state. En 1987, la fonduso helpis 16 studentojn je kosto de \$4,160.

Ĝenerale, la stipendioj profitas ne nur la unuopajn ricevintojn sed ankaŭ fariĝas solida investo por la usona movado.

(subskribis) Cathy Schulze

**JARRAPORTO PRI LA 18A JARO
DE LA ESPERANTO-KURSARO,
SAN FRANCISCO STATE
UNIVERSITY — 6/29-7/17 1987**

La 1987 Esperanto-Kursaro ĉe San Francisco State University ampleksas kvar kursojn: bazan, postbazan, mezan kaj superan. Ĉiujare la Universitato invitas konatajn instruistojn. Aparte elstaras la tri 1987 instruistoj: D-roj David Jordan (University of California-San Diego), Fabrizio Pennacchietti (University of Torino, Italy), kaj Vera Payne, M.A., University of Western Australia.

El foraj lokoj venis ankaŭ ĉijare kursanoj: Kanado, Japanio, Meksiko, Argentino, Bermudo, kaj Germanio. Entute la kursanoj nombris 51. Dek ses studentoj ricevis subvencion por la 1987 kursoj.

D-ro David Jordan iniciatis valoran serion de ekzamenoj: 1) antaŭtesto kaj 2) posta ekzameno. La unua ekzameno helpas trovi la ĝustan nivelon por ĉiu kursano. Tiu lasta indikas la progreson.

Krom la kontentiga profito al la universitato, ELNA profitas pro libro-vendado. La grandskala librovendo al kursanoj profitas ne nur ELNAn sed Esperanto-eldonadon ĝenerale.

Aldone al la prestiĝo rilate al la universitato, kaj la profito al ELNA, mi ne povas tro emfazi alian gravan atingon — altigon de la lingvo-kapablo por kreskanta nombro de usonaj Esperantistoj, inklude grandan nombron de junuloj. Pluraj komencis lerni pere de la senpagaj perpoŝtaj kursoj.

Grava rikolto de la kursoj ĉiujare estas la amikeco kaj inspiro kiuj riĉigas la vivon de la partoprenantoj.

(subskribis) Cathy Schulze

**JARRAPORTO: SENPAGA
10-LECIONA PERPOŝTA KURSO**

Nun en la 6a jaro, la senpaga poŝta kurso fariĝas la plej utila fonto por novaj adeptoj de Esperanto.

La nuna kurseto rezultigas proksimume 15 elcenton da kurs-finintoj. Mi persone akiris, komence en 1982, karto-tekon de pli ol 2,765 lernantoj (sumis 585 ĉijare). Kontentiga nombro aniĝas al ELNA.

Aliaj kurs-gvidantoj konataj de mi estas: Cleo Fort, Frank Helmuth, Roger Blaine, Bern Wheel, Stella Cope, Conrad Fisher.

La plej granda nombro da kurs-finintoj daŭrigas la studon. Al la 1987 SFSU-kursaro venis pluraj perpoŝtaj kursanoj. Kun la diplomo, mi donas konsilon pri uzo de vortaro, legolibroj, ekzamenoj, revuoj, kaj mi donacas la kongresan numeron de *Heroldo* kiu informas pri la multegaj okazaĵoj ĉe universalaj kongresoj.

Do, entute la perpoŝta kurseto estas trafa enkonduko al la lingvo kaj la movado.

(subskribis) Cathy Schulze

**RAPORTO DE LA REDAKTORO,
ELNA NEWSLETTER — 1987**

En aŭtuno 1978, mi komencis oficiale redakti la ELNA-NEWSLETTER. Tiu tasko fariĝis pli agrabla pro la kunlaboro de unuopaj membroj kaj kluboj, kiuj daŭre informas pri lokaj agadoj kaj sendas ĵurnal-artikolojn pri la lingva problemo ĝenerale. Menciindas la grafika talento de Gregory Wasson kiu, speciale lastatempe, kontribuas al la bona aspekto de la NEWSLETTER.

FOTOJ abundas kaj en tio notinde estas la kontribuoj de Doris Vallon-Wheeler kaj pluraj aliaj. Kvankam ne ĉiam troviĝas spaco en la NEWSLETTER por plenaj raporto, tamen gravas, ke ni sciu kie okazas valoraj agadoj. En ĉi Jubilea Jaro mi inkludis historian foton de Ges-roj Zamenhof en Washington D.C., 1910 kaj raporton pri Esperantopioniroj en Usono.

Mi vidas la celon de la NEWSLETTER jene:

1. Raporti agadojn de la lokaj kluboj kaj individuoj
2. Informi pri la lastatempaj atingoj de Esperanto en edukado, komerco, scienco, kaj popolaj rilatoj tutmondaj
3. Informi pri oportunaĵoj por turismo, klerigado (ekz. la diversaj bonaj kursoj kiaj ĉe San Francisco State University, Virginia Commonwealth University, University of California en Berkeley kaj Santa Barbara, kaj SUNY School of Arts and Sciences, Potsdam, NY)
4. Informi pri novaj instru-materialoj

5. Recenzi la abundan, valoran literaturon kiu nuntempe venas amase el la diversaj Esperanto-eldonejoj

6. La angla sekcio aparte celas informi la ĝeneralan publikon pri la nuna stato de Esperanto kaj pri oportunaĵoj por studi kaj uzi la internacian lingvon.

MI REKOMENDAS, ke membroj kaj lokaj kluboj antaŭmendu ekstrajn kopiojn de la NEWSLETTER por loka distribuado, ekz. al publikaj kaj lernejoj bibliotekoj. Por tiuj lastaj mi rekomendas NEWSLETTER-abonon por ili.

ALVOKO AL LA MEMBRARO:

Bonvolu sendi al la redaktisto ion ajn, kion vi taksas taŭga por la ELNA NEWSLETTER. Prefere, ke 3 personoj sendu la saman novaĵon, ol ke neniu ĝin sendu. Se el ĵurnaloj, NEPRE indiku nomon kaj daton de la ĵurnalo.

NOTO: Antaŭ verkado de ĉiu NL la redaktisto devas legi multajn leterojn kaj gazetojn el tuta mondo. Kompreneble ne ĉio povas eniri en la NL. Ofte mi konservas bonajn artikolojn por estonta numero de la NL. Sed mi legas ĉion kaj penas elekti saĝe.

Ni bonvenigas sugestojn por plibonigo de la NEWSLETTER.

(subskribis) Cathy Schulze

**JARA RAPORTO DE LA
KOMISIITO PRI VOJAĜAFEROJ,
FISKA 1986-7**

Dum la pasinta fiska jaro, mi daŭrigis la laboradon loke, nacie kaj internacie pri vojaĝaj aferoj por ELNA kaj por individuaj Esperantistoj en Usono. La klientaro de Esperanto Vojaĝ-Servo kreskas, kaj inkluzivas eĉ klientojn el ekster Usono.

Dum la ĵus pasinta jaro mi donis amason da informo utilan al personoj kiuj esprimis intereson en la Universala Kongreso de Esperanto en la Jubilea Jaro en Varsovio. Ni dissendis UK-aliĝilojn, informon pri hoteloj kaj ekskursoj, kaj aliajn utilajn informojn al ĉiuj petintoj. Tiel ni ŝparis al la Centra Oficejo de ELNA multe da laboro, kaj helpis al UEA. Mi persone vizitis Varsovion en la aŭtuno de 1986 por certigi ĝustajn informojn pri hoteloj, kongresejo, kaj ekskursoj.

Dum la jaro mi verkis artikolojn por ELNA NEWSLETTER prezentante utilajn informojn kaj reklamadon por la UK

kaj la nacia kongreso, kun la rezulto ke mi instigis al kelkaj ĉeesti tiujn kongresojn kaj pli aktiviĝi en la movado.

Laŭ mia scio, entute 96 Usonanoj iros al Pollando, el kiuj 89 uzas nian servon. Almete al tio estas 8 el aliaj landoj. Mi multe laboris por helpi al junaj Esperantistoj partopreni la kongresojn, eĉ se ili rekte aĉetis la loĝadon de UEA anstataŭ de nia servo. Nia interveno estas des pli helpa, pro la fakto ke por Usonaj Esperantistoj trakti aferojn kun UEA en Roterdamo estas temporaba kaj malfacila afero, eĉ kun la helpo de la CO de ELNA. En kelkaj okazoj, nia servo povis tuj aranĝi por junaj Usonaj Esperantistoj rimedojn, kiujn ili ne havis tempon aranĝi kun UEA.

Pro la nombro da biletoj aĉetitaj de ni, mi povis ebligi rabaton po \$50 al preskaŭ ĉiuj, kiuj partoprenis la grupvojaĝojn. Esperantistaj vojaĝantoj tiel ricevis rabate proks. \$2,500.

ELNA ankaŭ gajnas el la agadoj de Esperanto Vojaĝ-Servo; pasintjare, post la fina librotendado el la vojaĝaranĝoj por la UK en Pekino kaj la postkongresaj ekskursoj tra Ĉinio, pro sukcesa negoco kun NorthWest Airlines kaj kun CITS mi povis donaci al ELNA \$2,000; \$1,000 al la ĝenerala kaso kaj \$1,000 al la Eugene Thompson Fondaĵo. Post la fina librotendado ĉijare, mi refoje donacos al ELNA porcion el la profito.

Kunlabore kun Cathy Schulze, ni aprobis subtenon de vojaĝkostoj el la Eugene Thompson Fondaĵo de ELNA al kelkaj junuloj por ebligi ke ili partoprenu la kursojn ĉe SFSU en 1987. Ankaŭ aprobita el tiu fondaĵo estis helpa subvencio por taŭga junulo partopreni la TEJO-kongreson en Krakovo kun ekskurso al Sovetunio.

Ni daŭre esperas, ke la membraro de ELNA konstatos la avantaĝojn en la uzado de la servoj de Esperanto Vojaĝ-Servo. Ĝi estas plenkapabla vojaĝagentejo, kiu povas liveri la samajn servojn (aŭ eĉ pli bonajn) kompare kun iu alia agentejo por la samaj (aŭ eĉ pli favoraj) prezoj; samtempee helpante Esperantistojn kaj la movadon.

(subskribis)
Lucille C. Harmon

JAR-RAPORTO PRI LA ELNA PERKORESPONDA KURSARO

Nun funkcias tri perkorespond-kursoj sub la aŭspicio de ELNA: la Baza, la Mezgrada, kaj la Progresiga. Pri reklamado, ricevo de aliĝiloj kaj kotizoj, kaj la sendado de kurs-materialoj prizorgas ELNA: pri la instruantoj kaj elekto de stud-materialo respondecas la administranto.

En la Baza Kurso (EKK) estas entute 87 kursanoj, 13 el kiuj aliĝis dum la pasinta jaro. La jenaj 3 finstudis la kurson kaj ricevis diplomon:

Robert Ferris (Bellingham MA)
Marcee Schwenter (Kalamazoo MI)
Mark C. Stephens (Houston TX)

Dejoris kiel instruantoj pri la Baza Kurso Earl Bills (Mesquite TX), Conrad Fisher (Meadville PA), Cleo Fort (Sun City AZ), kaj (ĝis ŝia morto la 5-an de februaro, 1987) Florence Mack (Natick MA). La lernolibro estas JUNUL-KURSO, kun du ekzercaroj.

En la Mezgrada Kurso (MPEK), kiu funkcias jam de aŭtuno 1985, estas nun 11 kursanoj, el kiuj 6 aliĝis dum la pasinta jaro, kaj la jenaj 2 finstudis kaj ricevis diplomon:

Alvin M. Bretschneider
(West Nyack NY)
Pamela Freeman (Kileen TX)

La gvidantoj estas Cleo Fort (Sun City AZ) kaj Mary Lynn Tucey (Pueblo CO). La lernolibro estas STEP BY STEP, kun nova ekzercaro.

En la Progresiga Kurso estas entute 39 kursanoj, neniuj el kiuj aliĝis pasintjare aŭ finstudis. Funkciis kiel instruantoj de la Progresiga Kurso (PEK) Joseph Conroy (Philadelphia PA), Carlos de Jesus (Taunton MA), kaj, ĝis ŝia morto, Gretchen Doris (Tampa FL). Derek Roff (Albuquerque NM) estas nova instruanto. La lernolibro estas PAŜOJ AL PLENA POSEDO.

Kvankam ĉi tiuj kursoj ne celas lernigi paroladon, kursanoj rajtas laŭ interkonsento komuniki kun siaj instruantoj per sonbendo kaj tiel plibonigi sian parolkapablon.

Ĉar pasintjare ni perdis kelkajn el niaj instruantoj, ni bezonas pli. Tiuj kiuj interesas labori tiel, kaj ricevi malgrandan monan kompenson, bonvolu kontakti la administranton, s-ino Holland-Kaupp.

(subskribis) Doroteo Holland-Kaupp

JAR-RAPORTO DE LA USONA EKZAMENA SERVO

El la 44 kiuj ekzameniĝis per la KOMENCGRADA EKZAMENO, ĉiuj sukcesis, 22 kun honoro, jene:

*Roberta McFarland (Pleasant Hill CA)+
Winston German (Cupertino CA)+
*Richard D. Langley (Orangevale CA)+
Lou Ann Lawrence (San Diego CA)+
Francois E. Gouthier (Port-au-Prince Haiti)+
*Sandy Thacker (Oakland CA)+
*Franjo Ankona (Los Angeles CA)+
*Sally N. Lawton (Easthampton MA)+
*Sister Francis Mason (Davenport IA)+
*Lillian Rachele (New York NY)+
Gladys Ortiz (Rio Piedras PR)+
*Dan McMannis (Portland OR)+
*David L. Trautmann (Durango CO)+
Seuti Eto (Tokyo Japanio)+
Michael Smith (Washington DC)+
*Josef Blum (Orlando FL)
Tomas Sarramia (San Juan PR)
*Sylvia Bogdan (Concord CA)
*Andrew McConnell (Napa CA)
*Tom Monticue (Baldy Mesa CA)**
Marion H. Sharp (Escondido CA)
*Thomas C. Storck (Greenbelt MD)
Deborah A. Chacon (Thousand Oaks CA)
Charlene M. Burnham (Simi Valley CA)
Susanne E. Benson (Camarillo CA)
*Myron A. Bondelid (Oxnard CA)
John P. MacDonald (Spring Valley CA)
Maha Sawaya (El Cajon CA)
*Thomas W. Rubinstein (Encinitas CA)
*Robert T. Simmonds (Oneonta NY)**
*Jay M. Coskey (La Jolla CA)
William Colburn (San Jose CA)**
Roy J. Schlemmon (Newport Beach CA)
*Anthony Y. Wong (Orinda CA)

William T. Colvard (Victorville CA)++
 Riĉjo Davis (Roseville CA)++
 Melinda L. Deitch (Rancho Palos
 Verdes CA)++
 Sylvia A. French (San Jose CA)++
 Sylvia Leticia German (Los Angeles
 CA)++

Laszlo Jakusovsky (Ventura CA)++
 Scott Schoenberger (Malibu CA)++
 *Stejsi Titl (Long Beach CA)++
 *Susan K. Dent (Rancho Palos Verdes
 CA)++

*Tyrone McClamb (Sykesville MD)

El la 6 kiuj ekzameniĝis per la
DUAGRADA EKZAMENO, ĉiuj
 sukcesis, 4 kun honoro:

William A. Shanks (Mesa AZ)
 *Doris Wheeler (Goldendale WA)
 *Dorothy Keeble (Upper Rawdon NS
 Kanado)
 *Todd C. Moody (Philadelphia PA)
 *John Atkinson (San Diego CA)
 Laurino Chiro! (Santa Barbara CA)

El la 2 kiuj ekzameniĝis per la
SUPERA EKZAMENO (antaŭe nomita
MEZGRADA), ĉiuj sukcesis, 1 kun
 honoro:

*Ronald J. Glossop (Jennings MO)+
 John H. Fulton (Yucaipa CA)

Lastjare ekzameniĝis entute 63; ĉijare
52.

*Kun honoro +Ĉe SFSU julie 1986
 ++Ĉe UCSB 10-semajna kurso
 **Mem-instruita

Enspezoj: Saldo la 1-an de julio, 1986:
 \$235.27

51 kotizoj po \$3 + \$2 donaco	\$155.00
Tuta bonhavo	\$390.27
<u>Elspezoj</u> : Poŝto	\$106.69
Manpresado	\$ 89.00
Aliaj	\$ 21.00
Tutaj elspezoj	\$216.69
Saldo la 1-an de julio, 1987:	\$173.58

Ĉar ĉijare la elspezoj estis \$61.69 pli ol la
 enspezoj, oni altigos la kotizon al \$5 post
 la 1-a de septembro, 1987.

(subskribis) Doroteo Holland Kaupp

NEKROLOGE

Edgar Mason

Long-time ELNA member Edgar Mason passed away on October 5, 1987. He learned Esperanto a number of years ago after the death of his father so that he could answer his father's many Esperanto pen pals. He was active for many years in the Spokane Esperanto Society.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

(Nov. 1909-Dec. 1987)

La tuta Esperanto-movado funebras la forpason de Ivo Lapenna. Profesoro Lapenna estis la arkitekto de la moderna Universala Esperanto-Asocio. Komitato kaj estrarano de la Asocio, kaj kiel ĝia prezidanto dum deko da jaroj, li direktis ĝiajn energiojn al la publika prezento de Esperanto al la plej altaj instancoj. Li estas konata kiel ĉefa rolanto en akceptigo de ŝlosila rezolucio favora al Esperanto ĉe la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo en 1954 kaj kiel pledanto por Esperanto antaŭ ŝtatestroj, intelektuloj kaj sciencistoj.

La firma kaj senkompromisa sinteno de profesoro Lapenna pri la seriozeco de la pretendoj de Esperanto faris lin granda malamiko de ĉia misuzo kaj misprezento

de Esperanto, kaj de sektismo kaj diletantismo. Li insistis pri plej altaj normoj en la lingvouzo kaj pri respekto al la humanecaj idealoj de la Internacia Lingvo. Li estis brila informanto por Esperanto —jam en siaj studentaj jaroj en Jugoslavio kaj poste kiel gvidanto kaj inspiranto de la informa laboro en UEA. Tra ĉiuj malfacilaĵoj kaj seniluziigoj li restis senlaca laboranto por la lingvo. Li estas aparte memorate kiel brila oratoro kaj talenta verkisto en la Internacia Lingvo. Multaj ankaŭ memoras lin kiel instruantoj kaj inspirantoj de tuta pli juna generacio de aktivuloj por Esperanto.

Profesoro Lapenna mortis en la Zamenhof-Tago de la centa jaro de Esperanto. Se lia forpaso markis la finon de unu epoko en la historio de Esperanto, despli gravas, ke ni daŭrigu konscie kaj konsciencie lian laboron en la duan jarcenton. Nenio alia pli bone taŭgas por honori lian memoron.

Al la vidvino kaj ĉiuj aliaj familianoj, amikoj kaj kolegoj mi esprimas, nome de UEA, sincerajn kondolencojn.

Humphrey Tonkin
 Prezidanto de UEA

ELNA MEMBERSHIP NOW!

The Central Office urges you to send in your membership fees as soon as possible. The staff is now in the process of putting together the *Membership List* and needs all former members and people desiring to become members to send in their fees immediately.

ELNA membership is on a calendar year basis, and entitles members to receive the latest in information on the Esperanto movement through the *Newsletter* and various fliers that the Central Office sends out during the year.

ELNA members receive a 5% discount on all orders as outlined below:

All members receive a 5% discount on all merchandise (books, pins, recordings). Be sure to deduct this discount before tax and the usual shipping/handling charges. To be eligible for the discount, please mention on the order form that you are a member of ELNA.

The discount is NOT applicable to the Surprise Package offer, to subscriptions, or memberships. It does not apply to special orders. See the flier enclosed with the latest catalog for all the details.

To be included in the 1988 membership list, send in your fees by April 30, 1988. Do it now and reap the benefits!



Book Reviews

Piĉ, Karolo: *La Litomiŝla Tombejo*. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1981. 276p. Broŝurita. Prezo ĉe ELNA: \$17.95.

Iomete malfruas por recenzi libron eldonitan antaŭ sep jaroj, sed nur lastatempe mi kaptis la okazon vere profundigi en ĉi tiu grava, legebla, leginda, sed certe tre ĝena verko de nia ĉefa Akademiano. Mi konfesas, ke mi vere timis fronti ĝin dum longa tempo; sed, leginte la lastatempe aĉetitan *Mortsonorilo de Chamblay* far la sama persono, mi finfine ekkuraĝis.

Temas pri la vivo, suferoj, amoj, eĉ amoroj de nenomita esperantisto-Akademiano, kiu pasigas preskaŭ la tutan vivon en la malgranda (10 000 homoj) ĉefa urbo Litomyŝl. La leganto sekvas lin tra la infaneco, la adoleska trookupiteco pri sekso, la universitato, la milito, la adolta trookupiteco pri sekso, la mezaĝo, la mezaĝa trookupiteco pri sekso, finfine ĝis la maljuneco kaj la maljuneca trookupiteco pri sekso. La verkinto bonvolu pardoni min pro mia (sendube erara) supozo, ke troviĝas kelkaj (eventuale malgravaj) aŭ tobiografiaj elementoj en la romano.

La libro estas verkita en la sufiĉe malofta kaj malfacila duapersona stilo; nur unu alian fojon mi legis sukcesan duapersonan verkon. La lingvaĵo estas multekolora, flustila, facile legebla sed ne primitive simpla. El ĉiuj nuntempaj originalaj verkistoj en Esperanto, Piĉ eble plej bone scipovas priskribi. Li ankaŭ bone kaptas la aŭ tentajn nuancojn de la diversaj homaj sentoj. Min plej forte trafis la jena citaĵo, pri bicikla ekskurso, sur paĝo 147:

Vi veturas al Bruno. Vi volus vidi etapostarton. Traceo Litomiŝlo-Bruno ne estas facila. Ĝi havas tre varian profilon kun longaj dekduprocentaj scendaloj kaj descendaloj, kaj kun grandaj altodiferencoj. Vi pedalas. Tamen iel vi ne sukcesas trafi la ĝustan ritmon. Vi lacas. Kaj via ekskurso, iom post iom, nehaltigeble, iĝas elĉerpa

izola tempalo, jam antaŭ e perdita lukto, iaspeca privata veturo "contre la montre". Valoraj sekundoj senhelpe trafalas kaj perdiĝas. Kilometroj pasas ege malpli rapide ol minutoj. Kaj vi jam scias, ke vi ne ĝisveturos ... Vi volus cikli pli verve, pli elane ... Vi leviĝas sur la pedaloj ... Vane ... Vi ne kapablas pli ... Fine vi restas stari arbarrande, tridek kilometrojn antaŭ Bruno. La arbaro odoras. Kolinoj, hiloj kaj kurtaj dorsoj grize verdas. Kaj vi ploras ... Same, kiel pluraj aliaj viroj, kiuj devis descendi dos la biciklo jen mezvoje al Tourmalet, Ventoux, Col de Puymorens aŭ Col de Pylesoudre, jen ĉepiede de Mont Perdu, Pic d'Anethou aŭ ie inter Luchon, Lourdes, Tarbes kaj Pau.

Vi ploras ... Pro tio, ke vi ne ĝisveturis ... Sed ankaŭ pro tio, ke tiu halto, iel, egalas al malvenko kaj al fino de etapo ...

Per la foriro el Poliĉko finiĝis via junaĝo. Per la descendo dos biciklo ĉi tie, finiĝis alia via sennoma vojparto. Vi transpasis la zeniton. Vi lasis post vi la someran solsticon ... La suno plu lumas ... La deklivoj odoras timiane kaj rezine, kaj somerece verdas ... Sed la vojo antaŭ vi jam iras aŭ tunen ... Nun ĉiam pli kaj pli ofte vi posedados arbarande.

Se en ĉi tiu citaĵo troviĝas prozo, kiu tuŝas la koron kaj sperton de ni ĉiuj, ankaŭ troviĝas la plej ĝena afero en la verkado de Piĉ. Nome, li estas lingva eksperimentemulo. Kaj ne foje eksperimentemulo; ne, li devas eksperimenti pogrande. En ĉi tiuj kelkaj alineoj vi povas vidi novajn afiksojn (-al, po-), novan prepozicion (dos = "de sur"), kaj diversajn novajn radikojn (kolino, hilo kiel sinonimoj de monteto). Tiun tutan aferon Piĉ klarigas en postromana eseo (paĝoj 229-251), kaj li provizas ampleksan glosaron; sed ĉiu novaĵo siavice kontribuas al rompo de la pensoĉeno de la leganto. Ĉu tiom necesas tiuj novaĵoj? Kial ne simple "kun longaj dekduprocenten-

taj soriroj kaj sobiroj"? (sor kaj sob estas zamenhofaĵoj.) "Deklivoj, montetoj kaj mallongaj dorsoj grize verdas" — ĉu tio ne havas egalan sonoron, kaj pli tujan kompreneblecon? "Kiuj devis depaŝi de sur la biciklo" — eĉ aliteracia, ĉu ne? Sed Piĉ insistas mislegigi la leganton per amaso da tunkoj, aŭ temoj, namoj, aktoj, ktp. Eĉ liaj elkreitaj interjekcioj, kiel dank, foje misas.

Nu, malgraŭ tiuj kritikoj — kaj laŭ mi ili estas gravaj — la libro certe restas leginda. Mi ege ĝuis ĝin, kaj esperas, ke vi havos la saman sperton. Kaj, malgraŭ la iomete malfeliĉa fino, ne forgesu, ke la verkisto eldonis tri verkojn post ĉi tiu.

—Don Harlow

Piĉ mem estas UEA delegito en Litomyŝl. Tamen, por eviti, ke oni miskomprenu pri la idento de la ĉefrolanto, li avertas, ke "ĉiuj historioj, eldiroj, personoj, nomoj kaj roloj de ĉi tiu romano estas tute elpensitaj kaj fikciaj. Se al iu ili tamen memorigus iun aŭ ion, tiam temus pri koincidoj kaj similaj absolute hazardaj kaj nepre neintencitaj." Domaĝo! Mi preferus, ke la fikcia ĉefrolanto estu reala persono!

Sciencfikcia novelo, anglalingva, de Lester Del Rey.

Sur p. 253 Piĉ klarigas, ke -al estas PIV-sufikso kun adjektivsubstantigiva senco. Nu, mi tute ne trovas tiun uzon en PIV (pp. 27-28). Ekzistas propono pri sufiksa uzo de -al en PAG, sed tie temas pri substantivadjektiviga uzo (ekz. en la serio varma = hot -> varmo = heat -> varmala = thermal).

Malgraŭ klarigo sur p. 237, po- ne parencas kun la homonima prepozicio.

Ambaŭ vortojn proponis Fernando de Diego en *Pri Esperanta Tradukarto*. Kolino estas latindevena vorto netrovebla en PIV; la vorto hilo jam havas du biologiajn signifojn.

Piĉ ne estas la unua esperantisto, kiu eraris, supozante ke la zamenhofa duon-idiotismo "dank' al Dio" estas kontraŭfundamenta, vidante en ĝi la mal-permesendan elizon de -on el "[Mi deziras] dank[on] al Dio" anstataŭ la eliziitan religiecan esprimon "[Estu] dank[o] al Dio."

Interese estas, ke la finaĵo de la libro iasence eĉas la finajn vortojn de la poeto A.E. Housman en la konata poemo "Bredon Hill".

SFSU '88 Courses

June 27–July 15

1988 promises to be another good year at San Francisco State University's Summer Esperanto program. So far, applications have come from Japan, Mexico, England, Iran and Morocco. This will contribute to the international atmosphere of the sessions again this year.

The summer Esperanto program at San Francisco State is a live-in program, where participants live for three weeks with their instructors and speak only Esperanto in class, at meals, in evening study groups, at evening songfests, and during weekend excursions and garden parties hosted by local Esperantists. Instructors divide each session so that students receive the advantages of a variety of methods and course content.


Classes are planned to allow for evening Esperanto programs, including group singing, slide shows, discussions, and colloquia on methods and materials for teaching Esperanto in a variety of situations. The schedule of these non-credit sessions will be announced in class.

Students are all housed in one section of Verducci Hall. This facilitates small group discussions, social gatherings and songfests — as well as quiet study — far away from loud stereos and distractions from non-Esperanto students. The cool San Francisco summers are conducive to study. But most of all, it is the many valuable friendships formed each summer that bring many participants back year after year.

Students choose one of the four levels of instruction according to their Esperanto proficiency. A test during the first morning's orientation assists the student in making this determination.

Instructors will be:

Dr. Duncan Charters, Ph.D., Associate Professor of Foreign Languages and Education, Principia College, Elmhurst, Illinois. Dr. Charters holds a B.A. (Hons.) and M.A. in Modern and Medieval languages from Cambridge University, England, and the A.M. and Ph.D. degrees in Hispanic Language and Literature



Verducci Hall at San Francisco State University, home for the students of the SFSU Summer Courses in Esperanto.

from Indiana University. He is fluent in Spanish, Esperanto, and French, and is well-acquainted with Portuguese, Catalan, and German. He has taught language, literature and teaching methods at Indiana University, Wabash College, The Experiment in International Living, and Humboldt State University, and has held his current post at Principia College since 1974. Esperanto experience includes: the Esperanto youth movement in Great Britain, including editorship of *Kial Ne?*; teaching, development of materials, teacher training in the language at several U.S. colleges and universities; winner of the international oratory contest at the World Esperanto Convention in Vienna, 1970; assistant to William Auld in the founding years of the SFSU summer Esperanto program; director of the Espe-

ranto program at the University of Portland preparatory to the 1972 World Esperanto Convention. He has published professional papers, a booklet for teachers, teaching materials, tapes and two records, as well as an English translation of William Gilbert's *Planlingvaj Problemoj*. He is Vice-President of the Esperanto League for North America.

Dr. Edmund Brent, Ph.D., Language Counselor for the Office de la langue française (Government of Quebec Language Planning Agency), Montreal, Canada, and concurrently Lecturer, Department of Linguistics, Université de Québec at Montreal (UQAM). He holds a B.A. (Hons.) in Modern Languages and Literatures (French and Slavic Studies), University of Toronto, and an M.A. and

Ph.D. in linguistics, Cornell University. He is fluent in French, English, Esperanto and German; proficient in Mandarin and Russian; and can read Old Bulgarian, Classical Greek, and Latin. He was previously Assistant Professor, Graduate Department of Education Theory, Ontario Institute for Studies in Education (OISE), University of Toronto). He has been an organizer and instructor of the Esperanto summer courses at Brock University, Canada; has taught sociolinguistics in the Esperanto summer university program at the University of Liege, Belgium; and is currently a member of the Terminological Esperanto Center on the auspices of the Universala Esperanto-Asocio (the World Esperanto Association based in the city of Rotterdam, Netherlands).

Dr. Amri Wandel, Ph.D., Research Associate in astrophysics at the Center for Space Sciences and Astrophysics, Stanford University and NASA/Ames Research Center, where he leads a research team in quasars and cosmic rays. He holds a M.Sc. and B.Sc. (Hon.) in physics and a B.Sc. in mathematics and computer science, Tel Aviv University, as well as a Ph.D. in astrophysics, State University of New York, Stony Brook. He is fluent in Hebrew, English and Esperanto, and conversant with German, French and Spanish. He is a member of the International Academy of Sciences (San Marino). A former chairman of TEJO, the World Esperanto Youth Organization, he wrote and presented a university mini-course of Esperanto on Israeli radio and wrote the Supplement to the Correspondence Course. He has developed computer programs for Esperanto teaching, and has lectured on this subject at linguistic conferences. He has been an invited lecturer at the International Conference University during World Esperanto Conventions in Augsburg (1985) and Warsaw (1987). In addition to many scientific articles in the professional journals, he has edited and published the cassette and book *Israelo Kantas* (1982), translated the children's book *Venis Vespero* (1987), and frequently contributes to the international Esperanto periodicals that appear throughout the world.

Courses available this year will include:

Basic Course Welcome to Esperanto. For students with no previous instruction in Esperanto, this course develops basic functional ability in the language. Esperanto was designed to be considerably easier than other languages. The basic grammar and elementary vocabulary are taught through conversational dialogues and situations, giving the student an opportunity to practice the language in a realistic context. The goals and current uses of Esperanto for travel and education will also be discussed. Its regularity enables rapid progress in the three weeks, and teachers intending to introduce Esperanto in grade-school or high-school enrichment programs should find this course adequate background from which to begin.

Advanced Basic Course Gaining Confidence in Esperanto. For those who have made an initial study of Esperanto, either in class, through correspondence, or on their own, this popular course, conducted in Esperanto, focuses on developing communicative ability in Esperanto. It provides a systematic review of basic structure and vocabulary. Students will learn how to talk about events related to their personal experience. They will role-play situations they would encounter in international meetings of Esperanto speakers and in homes where Esperanto is spoken.

Intermediate Course Esperanto in Practice. This course is for students who have a basic knowledge of Esperanto, and can understand, speak, read, and write the language to some degree but not with facility. Language skills will be developed through role-playing, skits, and presentations. A careful study of the structure of the language will review the basics and those points which English speakers find more difficult. Esperanto culture, traditions, and literature will be discussed through readings.

Advanced Course Esperantology: Sociolinguistic Perspectives. This course, given in Esperanto, presents a critical examination of selected topics in Esperantology, the scientific study of Esperanto from a sociolinguistic and language planning point of view. The approach is both theoretical and practical. Topics

highlighted: language variability, language norms, communication in the Esperanto-speaking community, linguistic and non-linguistic factors in the acceptability and spread of Esperanto, and Esperanto terminology. Some class sessions will be devoted to problems of translation. Colloquia will be offered according to student interest on such topics as writing, oral presentations, discussions and conversation, global education, cross-cultural communication, advanced grammar problems, literature, bilingual education of children, consecutive and simultaneous interpreting.

Methods of Teaching Esperanto (Optional). This course may be taken only in conjunction with enrollment in the Intermediate or Advanced courses. Taught entirely in Esperanto, it is designed to enable participants to become ready to teach the language, or to improve their current skills. There will be special emphasis on how to teach for proficiency in the four language skills plus grammar and culture, as well as discussion of materials currently available and how to adapt them to proficiency-oriented criteria.

Computer Lab at the 1988 SFSU Esperanto Program. This program will include computer-aided instruction and exercising at all levels. Students will use Macintosh and AT&T (IBM-PC compatible) personal computers at the new computer labs of SFSU. Among the programs to be used are the Esperanto drill program EI, the language instruction programs DASHER or MACLANG especially adopted to Esperanto for the SFSU program, and an Esperanto version of the psychiatrist program ELIZA.

Each course is worth three units of college credit except for the Teaching Methodology course, which is worth an optional fourth credit.

SFSU Fellowship Fund is in its 19th year. Clubs and individuals are invited to send contributions and to recommend students for advanced studies. Interested students should write in Esperanto giving their Esperanto histories to:

CATHY SCHULZE,
410 DARRELL ROAD
HILLSBOROUGH, CA 94010,
(415) 342-1796.

Kelkaj Rekomendoj

Sub la rubriko de "rekomendoj" la redaktoro volas mencii al vi plurajn librojn—haveblajn aŭ ĉe la C.O. de ELNA aŭ rekte ĉe UEA — kiuj eventuale povos interesi plurajn aŭ multajn niajn anojn.

Dum lastaj jaroj aperis pluraj interesaj libroj pri Esperanto kaj Esperantologio. Havebla ĉe la Centra Oficejo estas la anglalingva verko *The Artificial Language Movement* de Andrew Large (Oxford kaj New York: Basil Blackwell, Ltd., 1985. 239p. Bindita aŭ broŝurita). La kompendio de Large estas pli detala kaj faka ol la samcela verko de Mario Pei, *One Language for the World*, kiu cetere estas ne plu havebla. Grandan parton de la verko li dediĉas al Esperanto, kaj tiu parto estas sufiĉe objektiva — eble ĉar li pli funde esploris la temon ol la kutima suprajeca lingvisto (tamen restas kelkaj, nemultaj, el la kutimaj absurdaj kritikoj pri Esperanto, ekz. protesto kontraŭ la "manko" de la internaciaj radikoj *hospitalo* kaj *radaro*, kiuj ambaŭ troviĝas en PIV).

Du daŭraj serioj de esperantologiaj verkoj meritas atenton: la grandformataj *Akademias Studoj*, ĉiujare eldonataj ĉe Rudiger Eichholz en Kanado (kelkaj volumoj ankoraŭ haveblas ĉe ELNA), kaj la referatoj de la Sciencaj Interlingvistikaj Simpozioj, kiujn eldonas la Akademickie Centrum Interlingwistyczne en Varsovio en la jara revuo *Acta Interlinguistica*. En la volumo 12 de tiu lasta serio (kiun mi ankoraŭ ne ĝisfine legis) mi trovis almenaŭ du eksterordinare inter-esajn artikolojn. "Ĉu ekzistas lingvaj kriterioj de internacieco?" far Pierre Janton de Francio malsukcesas pruvi sian tezon, laŭ mi, tamen montras kelkajn inter-esajn apartaĵojn de Esperanto kiuj faras tion pli fleksebla kaj supla ol la etnaj lingvoj. Kaj "Specifeco de fonaj scioj de la personoj uzantaj Esperanton" far Alesandr Melnikov de Sovetunio estas preskaŭ nepraĵo por ĉiu persono, kiu volas argumenti pri la ekzisto de aparta Esperanto-kulturo.

Tute nova verko samtema estas la *100-jara Esperanto*, redaktita de Geraldo Mattos (Chapeco: Fonto, 1987. 239p. Broŝurita. Prezo ĉe ELNA: \$10,50). Ĝi enhavas 16 artikolojn far sama nombro da Akademianoj. Aparte interesaj estas "La evoluado de Esperanto observita tra tradukoj de Ŝekspiraj dramoj" far Marjorie Boulton, longa artikolo far Bernard Golden pri la daŭra milito inter komputilo, komputero kaj komputoro, kaj la historia klarigo "Lazaro Zamenhof komandoro de la Reĝa Ordeno de Izabela la Katolika" far Juan Regulo Perez. Tiu lasta, cetere, reciproke prilumigas la premiitan eseon de Roberto Lloancy "Kongresa enigmo aŭ enigma kongreso?" (Fonto, Marto 1987, pp. 23-33) pri la politika signifo por Hispanio kaj Katalunio de la Barcelona Kongreso de 1909.

Lastatempe la Berklija Grupo okazigas ĉiusemajnan literaturan studgrupon pri Esperanto. Ni trovis, ke du el la plej utilaj libroj por tiu studo (krom, kompreneble, la literaturaĵoj mem) estas la volumoj *Kaj la ceter'* — *nur literaturo* de Gaston Waringhien (Antverpeno: Stafeto, 1983); kaj la Festlibro por Waringhien *Li kaj Ni*, sub editorado de Reinhard Haupenthal (Antverpeno: Stafeto, 1985). La unua verko estas la kvina volumo da eseoj verkitaj de nia majstra eseologo, Waringhien; kaj por nia grupo, plej utilaj estis du eseoj en la unua sekcio: "Kalocsay kaj mi", pri la duonjarcenta amikeco inter Waringhien kaj la budapeŝtano, kiu preskaŭ unusole kreis la Esperantan poetikon; kaj "La Budapeŝta Skolo", pri la historio de la verkintoj, kiuj iam grupiĝis ĉirkaŭ la lamentata Literatura Mondo. Tamen aliaj partoj de la verko ankoraŭ estas valoraj legajoj, aparte en sekcioj du kaj tri. La kvara sekcio, kiu kondukas nin en la misterojn de la literaturoj de okcidenta Eŭropo, ne estas tiel ĝueblaj; sed la eseon pri Kipling mi plene ĝuis.

Li kaj Ni estas unu el tiuj libroj, kiujn oni preparas honore al korifeoj, kiam ili mem fariĝas tro maljunaj por plezuri pri

tio (similan verkon, kelkvoluman, oni nun eldonas en la hispana kaj Esperanto por Juan Regulo Perez sub aŭ spicio de la Universitato de La Laguna). Ĝis nun mi povis nur frandi inter la diversaj kaj diverstemaj eseoj verkitaj de 27 konataj esperantistoj; tamen, ĉiuj ĝis nun legitaj estas bonegaj, inkluzive la amuzan "La pseŭdonima Waringhien" de Michel Duc Goninaz (kiu literaturamanto ne scias, ke Waringhien estas ankoraŭ Georges Maŭra kaj Georgo Peterido Peneter, la filo de la konata Peter?)

(Por tiuj, kiuj bedaŭras la antaŭ longan malaperon de la pli fruaj esearoj de Waringhien, jen bona novaĵo: Antaŭ kelkaj tagoj mi vidis, en la C.O. de ELNA, novan aldonon al la stoko: *Belietro—sed ne el Katedro*. Temas pri iomete reviziita reeldono de la unua volumo de Eseoj, nuntempe preskaŭ legenda (en ambaŭ sencoj de la vorto!), kies unua eldono elĉerpiĝis antaŭ kvarona jarcento. Pri la prezo oni ankoraŭ ne informis min; supozeble ĝi estos alta, pro la lastatempa degenero de la dolaro. Tamen, la libro valoras la prezon—kiom ajn tio estos!)

Oni iam devos verki biografion de Kalocsay. Oni (t.e. Marjorie Boulton) jam faris tion por la bona amiko de Kalocsay, la poeto, romanisto, dramisto, reĝisoro kaj aktoro Julio Baghy. La verko *Poeto Fajrakora* (Saarbrucken: Artur E. Iltis, 1983) estas, kiel ĉiuj fakaj libroj de Boulton (ekz. *Zamenhof, Kreinto de Esperanto*, kaj *Ne Nur Leteroj de Plumamikoj*), estas facile legebla, taŭ ga kaj trafa, kaj plenplena de personaj ... nu, mi diru ne opinioj, sed emocioj. La libro meritas plenan recenzon; ĉi tie mi simple diru, ke estis plezuro tralegi ĝin. Mi sentas, kvazaŭ nun, pli ol 20 jarojn post lia morto, mi persone konatiĝis kun tiu vagabonda aktoro, kiu spertis nur tri jarojn da oficiala edukado, estis dum multaj jaroj militkaptito en Siberio kaj ĉiam poste suferis pro tio (vidu p. 99), kaj kiu ĝisfunde amis nian komunan lingvon, lia sola krom la denaska hungara.



VOLAS KORESPONDI

Amikeco trans limoj

CHINA

LIANG Ke

Chaoyang Qu Dongdaqiaolu 12
1-1-102 Beijing
filatelisto, pm neuzitaj, serioj

WANG Jian

Chi Kan Tang Chang Zang Jiang
Guang Dong
25j fraŭlo

Xi'ana Esperanto Asocio

p/a Gao Wei, No. 74 Xi Ying Lu
Xi'an
klubanoj serĉas korespondantojn

CZECHOSLOVAKIA

Familio Rennerovi

Rude Armady 54
27341 Brandysek
pri ĉiutaga vivo

In©. Radim Sury

Alšovo nam. 691/4
70800 Ostrava-Poruba
kolektas FDS, pm.; ofertas ĉefajn
novaĵojn

Josef Kristian

Ruzovy haj 1354
92901 Dunajska Streda
pm, bk, E-revuoj

Pavel Volf

Stadtrodska 1483
34701 Tachov
emerito; naturo, ŝakludo

Petr Janda

U Cvičište 11
312 16 Plzen
22j fraŭlo, bk, pm

D. R. GERMANY

Hannes Lamprecht

Dstr. 79
2131 Dedelow
23j fraŭlo pĉt.

FRANCE

Jan-marko Verger

La Ville tertre
F-60240 Chaumont en Vexin
biciklisto

HUNGARY

Agotai Ede

Kossuth ut 1 sz
H-5052

Andras Laszlo

Galle Tibor u 28
6326 Harta
universitatano, pri motorcikloj

Fulop Tamas

Beloianisz u. 15
H-2400 Dunaujvaros
18j gimnaziano, bona E-isto

Gimpel Laszlo

Kando Kalman 5
8300 Tapolca

26j. sportoj, muziko, bk

Koncz Arpad

Thokolt ter 21/6
H 3700 Kazincbarcika
28j histori-studento; turismo, muziko,
E-o

Kovacs Laszlo

Korany ut 41/a 3/11
4320 Nagykallo
studento

Magda Kerepesi

Huba 23, II 17
H-5900 Oroshaza
45j

Molnar Yazsef

Radnoti M. u. 33
H-9025 Gyor
36j fraŭlo, tefnikisto; lit.

Nagy Zsuzsanna

To ut. 5
2711 Tapioszentmarton
lernantino 7-grada

Palcso Annamaria

Eke utca 1
5100 Jaszbereny
14j lernantino

IRAN

Akbar Sagadiyan

Mokhtari Cross, Vahdat Islami
11979 Abazar Alley Tehran
22j muziko, fotoj, danco, teatro

Local Contacts

Berkeley: Box 324, Berkeley, CA,
94701, (415)222-0187

Boulder: E-o Assn., 4825 W.
Moorhead Cir., Boulder, CO,
80303

Chicago: E-o Society, , Box 1698,
Chicago, IL, 60690

Denver E-o Group: 995

Humbolt #205, Denver, CO, 80218

Florida E-o Society: 18757 Lake
Worth Blvd., Port Charlotte, FL,
33948, (813) 627-1020

Intertalk: 3610 W. 6th St. #537
Los Angeles, CA 90020

**Intermountain E-o Group (AZ,
CO, ID, MT, NM, UT, WY):** 4825
W. Moorhead Circle, Boulder, CO,
80303

Los Angeles: E-o Assn., 430 Peck
Drive, Beverley Hills, CA, 90212

Michigan: E-o Soc. of Michigan,
3540 Middlebury, Birmingham,
MI, 48010, (313)646-3106

Missouri: St. Louis Group, 8894
Berkay Ave., Jennings, MO, 63136

Montana: Montana E-o Soc., 330
Lindley Pl., Bozeman, MT, 59715

New England: ESNE, Box 44,
Fayetteville, MA, 01745

NYC E-o Soc.: 80-50 Baxter Ave.
#3D, Elmhurst, NY, 11373

Ohio: E-o Assn., 1144 Kingsdale
Terr., Columbus, OH, 43220

Orange Co., CA: E-o Assn.,
Box 1538, Garden Grove, CA,
92642

Philadelphia: 33 E. Roumfort
Rd. #A1, Philadelphia, PA, 19119

Phoenix: c/o Bill Shanks, 1345
W. Escarpa St., Mesa AZ, 85201

Portland: E-o Soc., 11905 SW
Settler Way, Beaverton, OR, 97005

Riverside, CA: E-o Group, 4336
Market #141, Riverside, CA,
92501, (714)681-4010

Sacramento: 2450 - 28th St.,
Sacramento, CA, 95822

San Diego: E-o Club, 3470

Juniper St., San Diego, CA, 92104,
(619)284-8081

San Francisco: SFERO, 410
Darrell Rd., Hillsborough, CA,
94010, (415)342-1796

Seattle: E-o Soc., 14833—39th
N.E., Seattle, WA, 98155

UN: Betty Manson, 14 Stuyvesant
Oval, NYC, NY 10009

Utah: E-o Club, Box 2166, Salt
Lake City, UT, 84110


Wash., D.C.: E-o Soc., 4406 -
35th St. NW, Wash., D.C., 20008

Esperanto League for North America, Inc.
P.O. Box 1129
El Cerrito, CA, 94530
Usono/USA

Nonprofit Organization
U.S. POSTAGE
PAID
Berkeley, CA
Permit No. 330

NEWS—PLEASE EXPEDITE

ESPERANTO



TRAVEL 1988

27 Jun–15 Jul THE BEST ESPERANTO CLASSES IN THE WORLD! 19th annual courses at San Francisco State University—4 levels from beginning through advanced with 3 outstanding professors: Dr. Edmond Brent of University of Montreal, Dr. Amri Wandel of Stanford, and Dr. Duncan Charters of Principia College. Speaking Esperanto adds immensely to the joy of travel.

15–20 July ELNA ANNUAL CONVENTION—San Diego, California. For those not going to Rotterdam, a “post-tour” is being planned to Grand Canyon, Yosemite, and San Francisco.

23–30 July 73A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO—ROTTERDAMO. As the headquarters of the Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam is the “ĉefurbo de la movado,” and the staff of UEA and the Loka Kongresa Komitato will certainly arrange an

outstanding program. Esperanto Travel Service has reserved moderately priced hotel rooms convenient to the modern convention hall.

30 Jul–7 Aug POST-UK CRUISE AND TOUR visiting local Esperantists. Cruise up river from Amsterdam along the Rhine River, calling at Cologne (Bonn), Braubach-Speyer (Heidelberg) and Strasbourg before disembarking and touring Basel, Switzerland. Then on to Bern and environs, and Geneva for a tour of the U.N.

15–22 Jul 44th INTERNATIONAL YOUTH CONFERENCE (IJK) Zagreb, Yugoslavia with the theme “Communication in the 21st Century.” The congress fee of \$150–\$210 (depending on age and whether paid before May 1st) includes lodging in student housing, all meals and events. Esperanto Travel Service will arrange air travel to combine the IJK with the UK at the lowest available fares for those wishing to attend both.

11–20 Sep ALL PACIFIC ESPERANTO CONFERENCE and AUSTRALIAN CONGRESS in Brisbane during the time of EXPO 88 in the same city. You can experience both with one air fare! An inclusive tour both before and after the All-Pacific Conference has been arranged by Esperanto Travel Service to cover the Great Barrier Reef, Sydney, and New Zealand as well as Brisbane—9 Sep–2 Oct.

ESPERANTO TRAVEL SERVICE
587 Grand Ave., Oakland, CA 94610
(415) 836-1710

Address Correction Requested
Return Postage Guaranteed



President: Ken Thomson
Vice President: Duncan Charters
Secretary: Virginia Stewart (1989)
Treasurer: John B. Massey (1988)
Other Board Members: David Wolff (1987), Dr. James Cool (1987), William R. Harmon (1987), Alberta Casey (1988), Ellen Eddy (1988), William Schulze (1988), Dr. Ronald Glossop (1989), Frank Helmuth (1989), Charles Power (1989)
Commissioners: William R. Harmon (CO), D. Holland Kaupp (Correspondence Courses), J. Gildemeister (Legislative Affairs), Ralph Murphy (Information), Conrad Fisher (Jubilee Jaro), R. Kent Jones (Science & Technology), H. K. VerPloeg (Tape Service), Lucy Harmon (Travel Affairs), J. B. Massey (Wills and Gifting), Ellie Stein (Women's Affairs), Dr. James Cool (Youth Affairs), Dr. Julius Manson (United Nations)
Director, ELNA CO: Mark Stephens
ELNA Archivist: Hal Dreyer

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member shown.

ELNA Dues: regular, \$25; family, \$37.50; youth (under 26), \$18; patron of USEJ, \$9 + usual membership fee; senior (65+), \$15; sustaining, \$50; life, \$500. Dues are for the calendar year and are tax-deductible.

ELNA Newsletter
Volume 23, No. 5–6
ISSN 0030-5065
Esperanto League for North
America, Inc.
P.O. Box 1129, El Cerrito, CA
94530
Telephone: (415) 653-0998
Editor: Donald Harlow
Typesetting & Graphic Design:
Gregory V. Wasson

Back issues available for
promotional use.